« Le Soir », Brussel (1, 8 en 20-12) kondigt E-vergaderingen en conferenties aan in het Brusselsche. « La Dernière Heure », Brussel (5 en 16-12) kondigt schikkingen aan met betrekking tot een E-cursus te Luik. Tot slot vermelden we nog dat uit verschillende vragen om inlichtingen, gesteld in « Pourquoil-Pas », Brussel (12 en 26-12), de interesse blijkt voor Esperanto.

We noteerden in 't geheel 16 artikels of mededelingen waarvan 9 in Vlaams-talige en 7 in Franstalige bladen.

RADIO

SOFIA (Bulgario) *marde kaj venrede*: 20.50 h. (oriënteŭropa tempo), 32.09 m. : prelego pri socia, kultura, ekonomia kaj politika vivo en la nova demokrata Bulgario.

Adreso : Radio-Sofio, Esperanto-emisio, Sofia, Bulgario.

PRAHA *ĉiutage*: 16.30-16.45 h. (GT) 49.92 kaj 1935 m. 22.00-22.15 h. (GT) 49.92 m.

lunde kaj ĵaŭde: 21.50-22.00 h. (GT) 470 m.

ĉiun unuan lundon de la monato: 22.00-22.30 h. (GT), 270 kaj 325 m. (verda stacio Praha).

Adreso : Esperanto-Servo de Radiostacio Praha XII, Stalinova 12.

MALMÖ *ĉiun unuan demanĉon de la monato*, la LKK organizas, de januaro ĝis julio 1948, disaŭdigojn, pere de kiuj informoj estos donataj pri la kongreso kaj ĝiaj aranĝoj.

Tempo: 15.00-15.15 h. (GT). *Ondoj*: 19.80 kaj 27.83 m.

Raportojn dankeme akceptos la 33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

L.E.E.N-Kongreso 1948

Almelo - Paskon - 27, 28, 29 Marton

La nederlanda neŭtrala movado LEEN kongresas ĉi-foje en Almelo, kiel kutime en la Paskaj tagoj. Sube ni skizas la programon, kiu sendube logos multajn ilandrajn samideanojn, jam spertintajn la gastamon kaj la gajon de niaj nordaj najbaroj.

Sabate: Transdono de la kongresdokumentoj (14 h.); Oficiala akcepto de la urbestro (16 h.); oficiala malfermo (17 h.); interkonatiĝa vespero (20 h.).

Dimanĉo: Jarkunveno (10 h.); Lunĉo kaj foto (12.45 h.); jarkunveno kaj/aŭ prelegoj (14 h.); komuna tagmanĝo (18 h.); festvespero — teatraĵoj kaj balo (20 h.).

Lunde: aŭtobusa ekskurso al Enschede (10 h.); adiaŭna teo en Enschede (15.30 h.).

Informojn pri kotizoj, loĝado ktp. petu *urĝe* ĉe S-ano N. Wolters, Bornerbroekstr. 89, Almelo (Ned.)

Internaciaj Feriaj Kursoj

Helsingor (Danlando)

17-24 kaj 24-31 de julio 1948

La kurskomitato de la Centra Dana E. Ligo ree invitas vin. La internaciaj kursoj okazos en la Internacia Altlernejo de Helsingor, tre bone situanta apud Kopenhago, ĉe la maro, meze de fagarbaroj kaj en agrabla parko. De la 17- ĝis la 31 de julio estos organizitaj matene diversaj kursoj (gvidantoj: S-ino Major, F-ino Noll, Sroj Morariu kaj Friis), kiam posttagmeze okazos ekskursoj kaj vespere amuzaj, prelegoj, dancoj kaj kantoj. Feriaj gastoj estas allasataj.

La kotizo por loĝado, manĝoj kaj kursoj estas tre malata: 85 d. kr (2-3 persona ĉambro) kaj 68 d. kr. (amasloĝejo.)

La 31-7-48 la partoprenantoj de la Universala Kongreso en Malmö, kune veturos tien.


F.I.L.E. eventuale aranĝos karavanon. Ĉiujn informojn petu ĉe S-ano Friis, Ingemannsvej, 9 Aabyhøj (Danlando).

XIII-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA,

BLANKENBERGE,

Pentekoston 1948 (15-16-17 de majo).

II-a KOMUNIKO.



Bildo pri la strando kaj promenejo.

PROVIZORA PROGRAMO.

Sabaton posttagmeze.

- Malfermo de la akceptejo.
- Malfermo de la Esperanto-Ekspozicio.
- Prelego.
- Interkonatiĝa festo kun balo.

Dimanĉon antaŭtagmeze.

- Vizito al la kongresurbo.
- Meso kun prediko en Esperanto.
- Oficiala akcepto de la kongresanoj fare de la urba magistrato.

Generala jarkunveno de F.I.L.E.

Dimanĉon posttagmeze.

- Komuna fotografiĝo.
- Komuna tagmanĝo.
- Vizito al la kongresurbo.
- Esperanto-festo kun kabareta programo.

Lundon.

- Ekskurso al Damme, Zoute.
- Fermo de la kongreso.

Esperantologio

Jen nova eldonota internacia lingvosciencia revuo pri E., kies signifon oni ne taksos sufiĉe alta por la progresado de E. Necesas minimume 350 abonoj.

Amplekso: kajeroj 48-64 p. ĝis volumo de 250-300 p. *Prezo*: por la volumo: 5 dol. (22 d. kr. —22 angl. ŝ.) *Enhavo*: ĉefe traktatoj pri E. lingvistiko. *Redaktado*: Prof. Dro B. Colindier (Sved); Prof. Dro W. Collinson (Angl.); Doc. Dro K. Kalocsay (Hung); Prof. S. La Colla (It); Dr W. Manders (Ned); Prof. Dro E. Privat (Svis); Magistro V. Setälä (Finn); Prof. G. Waringhien (Franc); Dro Ing. E. Wüster (Aŭstr).

Anoncu vin tuj, kiel abonanto, ĉe Dro P. Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K. (Dan.)

Praktikaj Informoj

Kongresa Sekretariejo: 24, Malecotstr.

Kongresa Kasisto: A. Pintelon, Baron Ruzettelaan 27, poŝtkonto No 4727.76.

Kongreskotizoj: 60 Fr. Por membroj kaj Amikoj F.I.L.E. kaj eksterlandanoj: 50 Fr.

La Kongreskomitato afable petas ke ĉiu tuj pagu la kotizon kaj tiel faciligu ĝian laboron.

Lastminute ni ekscias ke prezentos al la Kongresanoj la sabatan prelegon, S-ano Mason STUTTARD, de Amersham (Anglujo), helpredaktoro de « ESPERANTO », verkisto kaj beletristo; ĉar ĉi tiu eminenta Esperantisto estas nepre informita pri la organizaj kaj ĝeneralaj problemoj de la neŭtrala internacia movado, li parolados pri la diritaj demandoj, kies disvolvigo sendube ege interesos la F.I.L.E.-anojn!

Ekspostfoiro en Hannover

En septembro 1947 okazis en Hannover (Germanujo) la unua postmilita Ekspostfoiro, kiun vizitis pli ol 3.700 eksterlandanoj kiuj venis el 53 landoj kaj aĉetis por pli ol 34.000.000 da dolaroj!

En majo 1948 denove estos organizita tie ekspostfoiro kaj la loka E-grupo volas akiri la uzon de Esperanto kaj tial insiste petas ke ĉiuj helpu, skribante pri informoj rilataj al la pasinta kaj venonta Ekspostfoiro. Adreso: Ekspostfoiro Hannover, Hannover-Laatzten (20 a). Germanujo.

La sukceso estos nepre, se ĉiuj Esperantistoj helpas!



LA VERDA KORO, de Julio Baghy; dua populara eldono fare de la *Nederlandaj amikoj de la aŭtoro*, 55 p. Mendebila ĉe F.E.I.; prezo: 25 fr.

La subtitolo indikas la celon de la libreto: « Facila romaneto el la vivo de Esperantistoj en Siberio, por komencantoj, por daŭrigaj kursoj ». J. Baghy do dediĉas sian verketon al novaj adeptoj.

Ofte mi aŭdis plendojn de lernintoj de elementaj kursoj, i.a. ke ili tre malfacile kapablas legi kaj kompreni la librojn menditajn post la kurso. Nu, tiajn plendojn neniel provokos « La Verda Koro »! En 11 ĉapitroj kaj postparolo, la romaneto rakontas kiel hungara E-isto, militkaptito en Siberio (en kiu ni rekonas la aŭtoron mem), instruas Esperanton al diversnaciaj ĝelernantoj, stariĝas klubon, vekas fratecon, helpemon kaj amon. Ĉe la legantoj ĝi kaŭzas samtempe rideton kaj larmeton. Mallongaj frazoj, sintakso kaj vortelekto tutsimplaj, neologismoj neniuj! Ĉiu instruisto nepre rekomendu ĝin kiel unuan ĝegolibron, post elementa kurso. Krome la preso estas klara kaj la papero bona.

Mi nur rimarkis: p. 38, « la du aŭtomobiloj kuras, kuregas, p. 43, la vagonaro kuras, kuregas: « veturas, veturegas, rapidas, rapidegas », ŝajnas al mi pli bonaj; p. 69, « La granda... ŝipo staras ĉe la bordo »: mi preferus: *kuŝas*; p. 62, *financinan* ringon: sendube preseraro; p. 71: *poŭpo*, vere stranga vorto por antaŭa parto de ŝipo, steveno.

Resume: Vigle mi rekomendas « La Verda(n) Koro(n) » al novuloj kaj... al amantoj de simpleco en nia lingvo!

V. E. Terano.

LA PRAHISTORIO ARTO kaj LA BUDHISMO, ambaŭ verkitaj de Agostinho da Silva kaj tradukitaj de la portugala de José de Freitas Martins, resp. 21 kaj 23 p.; eldonis: *Portugala Eldona Rondo*. Mendebila ĉe la landa peranto: G. Basteels, Montenegrostr. 190, Vorst-Brussel; prezo: unu kajero, 7 Fr., ses kajeroj, 34 Fr.

La unua verketo celas enkonduki la leganton en la kulturon kaj priskribas la desegn-, la skulpt- kaj la gravurarton de niaj prapatroj, kiuj vivis en la praeпоk. Diversajn spurojn de tiuj artoj la esploristoj trovis en pluraj grottoj de Francujo kaj Hispanujo. Interesatoj pri la vivado de la antikvuloj certe malkovros en la libreto ion memorindan; la tekston ilustras diversaj figuroj. La lingvo estas bona, cetere kontrolita, kiel por la dua libreto, de la Literatura Komitato de A.L.E.

La BUDHISMO informas nin pri deveno kaj vivo de Budho, « la scianto », « la viziulo », kiu naskiĝis pli-malpli 550 jarojn antaŭ Kristo kaj fakte nomiĝis Siddharta. Ni ekscias kiel li forlasis sian facilan ekzistadon de riĉa nobelo kaj vagadis en monaĥaj vestoj, predikante sian doktrinon, sian vivkoncepton. Kristanoj sendube estos interesataj de la klarigoj pri Budhismo, kiu ne estas religio kaj ne konas diojn. Multaj tezoj igas meditati la leganton kaj kompari sian vivkoncepton kun tiu de la budhismo.

Mi citas du frazetojn el multaj menciindaj: « La homo, kiun ni nomas mortinto, estas efektive vivanto, kiel ni; li havas nur alian vivoformon, kiel li povos havi morgaŭ tiun de mineralo aŭ tiun de arbo ». « Morti estas unu el la diversaj aspektoj de estado ».

V. E. Terano.

LITERATURO

VENUSO

La vivo estas kia fabeleto. Kia la fabeleto, kiun Panjo rakontis, kiam ni ankoraŭ tute etis: ade la sama kaj ade nova.

Kion do havas la vivo, ke ni tiel ligigas al ĝi? Ĝi ĉiam iras sian saman iron de tagoj, sezonoj kaj jaroj. Kion do havas la panja fabeleto, kiun si ĉiam devis rerakonti?

La vivo estas fabeleto kaj la vespero vualita princino. Kiu jen atpaŝas en sorĉolumo kun susuraj vestoj. Iam ŝia dolĉa mano karezas niajn malsanajn ŝultrojn, iam ŝi deprenas sian vualon kaj ni fikse rigardas en la vizaĝon de Venuso.

Ĉar, en nia koro, iam ekflamas nova kaj blindiga: la pasio. La pasio de Adamo kaj de ĉiuj niaj posteuloj; la pasio de Casanova kaj de Aloizo de Gonzaga; via pasio kaj mia pasio, la vira pasio de ni ĉiuj. La potenca senracia, kiu malŝatas reglandojn kaj tretas korojn; la sovaga, jaluzo, kiu jubilas kaj ploras, kiu cedas antaŭ neniu glavo kaj sin ĵetas en la abismon; la blinda, senbrida, kiu ignoras prudenton; ĝi ridas al la futuro, ĝi kraĉas sur la paseon; la forta pasio, kiu naskas malforton, de kiu nur la rego fariĝas potenco.

Jen planedo, kiun ni nomas vesperstelo, ĝia vera nomo estas Venuso. Ni nomas ĝin stelo, ĉar la stelo foras, sed ĝi estas planedo kaj nomiĝas Venuso. Vespere, ĝi estas la unua kaj, matene, la lasta kaj la tutan nokton ĝia lumo radias sur nin. Ĝi plej proksimas al ni kaj ĝi estas simbolo, ĉar ĝia vera nomo estas Venuso. Ĝi radias fajra kaj granda, nova kaj blindiga, kiel la pasio kiu iam ekflamas en ni.

Kial Venuso neniam svenas el nia steloĉielo?

RIVERETO

Rivereto, kiu fluas inter verdaj bordoj. La tagoj iras, la noktoj iras, la tajdoj iras. Sed la rivereto fluas plu, ade plu, al la maro. La ondetoj tiel afable klaketas kaj spegulas bordojn tremverdaĵn. Tago la krestoj de Ĥ ondetoj orbrilas en la suno kaj ludas per argentaj sprucoj. Sed nokte la lumo dolĉe lumas en la malhela akvo. Tiam la maljunaj arboj aŭskultas plaŭdetajn fabeletojn: ili ridetas kaj kliniĝas iom antaŭen, ĉar sub lumo kaj steloj mallaiŭtas la ondeta lingvo. Tago kaj nokto. Sed la akvo fluas ade nova kaj freŝa. Ĝi karezas la fleksajn algojn kaj saltetas kontraŭ pezajn ŝtonojn; ĝi fluas tra verdaj paŝtejoj, preter altaj arboj kaj sub multaj malnovaj pontetoj, kie homoj staras, reve rigardante en la akvon; ĝi fluas ien plu al la maro.

Kaj la tajdoj iras kaj reiras, sed la rivereto fluas nelacigeble. Mallaŭte ĝi muĝetas en printempo, ĝi zumas kanton de granda atendo, kaj la birdetoj venas trinki ĝian sensoifigan fluidon.

En somero ĝi gaje kaj vigle plaŭdetas, ĝi kantas kanton de oro kaj argento kaj ventumas freŝon al la mallaboremaj bordoj. Kaj en ĝia agrabla akvo snufante baniĝas la buboj.

Tiam venas aŭtuno. Kaj la pluvo gutas en cirkletoj, kaj la vento blove sulkas la akvon, kaj la rivereto svelas kaj pli rapide fluas. Sed jen, nun kunfluas folioj, flavaj kaj brunaj folioj, kaj etaj nigraj branĉoj. Kien ili veturas? Nu, ien, neniu tion scias. Aŭskultu, laŭ la bordoj flustras intima kanto de adiaŭo.

Vintre. Tiam ĉio staras nuda kaj malvarma. Sed la rivereto ankoraŭ fluas kaj kuragige babilas kun ĉiuj aĵoj survojoj. Ĝi diras konsolon kaj esperon al nigraj kampoj, al altaj, nudaj arboj, al junulo, kiu kliniĝis sur malnova ponteto kaj rigardas la movigan akvon. La akvo, kiu ondetas kaj fluas plu, ade plu, ĉiam plu, ien plu al la maro.

Verkis: K. Van Baelen
El la flandra: Hedero.

Hoekje van de Penningmeester.

LAATSTE WAARSCHUWING. Over één week wordt met het inmen van de lidgelden door de post aangevangen. Voor de achterblijvers dus een allerlaatste aansporing: stort nog vandaag uwe bijdrage voor 1948 op P.C.R. 232150. V.E.B. BRUSSEL; de bijdragen belopen, 75 fr.; inwonende leden betalen slechts 25 fr.; steunende leden, minimum 150 fr. Wenst U niet meer deel te maken van onzen Bond, zend ons dan een kaartje ten einde nutteloze kosten te vermijden. Wij danken U bij voorbaat.

I-a listo de subtenantoj de V.E.B.

- F-ino Top M. J. Veurne.
- S-ro Cortvriendt Em. Brussel.
- » Couwenberg Fr. Blankenberge.
- » De Graeve J. Wilrijk.
- » De Keyser Ad. Brussel.
- » Maertens Gr. Brugge.
- » Meeus C. S. Antwerpen.
- » Roose F. Brugge.
- S-ro Van de Pitte (Pastro) Gent.
- » Van Gindertaelen T. Mechelen.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Antwerpen. — Op 12 Januari j.l. greep de jaarlijkse statutaire algemene vergadering plaats. Er werd overgegaan tot de kiezing van het Bestuur, dat samengesteld werd als volgt: *Dhr Jacobs*, voorz., *Dhr De Boes*, vicevoorz., *Mejuffers L. Aartsen* en *Hofkens*, resp. 1-ste en 2-de sekretaresse, *dhr Van As*, penningmeester en bibliothecaris; *dhr F. Volders* blijft feestbestuurder. Het programma voor de maand Februari werd vastgesteld als volgt:

2.2.48: Varia vespero.
9.2.48: Solvado de enigmoj kaj de problemoj.
16.2.48: Parolado de nia vigla kaj cioscia S-ano H. Vermuyten.
23.2.48: Kantvespero, gvidata de S-ano J. Jacobs.

Iedere vergadering wordt tevens een gramaticaal gedeelte ingelast, ten einde de volmaking van de Esperanto-kennis der leden in de hand te werken.
Op 26.1.48 greep een treffende afscheidsbijeenkomst plaats: inderdaad een der verdienstelijkste leden, *dhr Lodema*, onlangs als Erelid der afdeling aangenomen, keert eerstdaags terug naar Nederland.

V.E.B. Afdeling Brugge. — De geboortedag van Dr. ZAMENHOF werd op de gepaste wijze tijdens een werkvergadering herdacht. Zoals ieder jaar greep ook dit jaar ons Kerstfeest plaats waarop alle leden uitgenodigd waren. Op ons Kerstfeest volgt dan ons jaarlijks Oudersfeest. Tot op heden werden er reeds 122 « Vrienden der V.E.B. » genoteerd.

V.E.B. Afdeling Mechelen. — Op 7.1.48 werden de lessen van de stadscursus na het gebruikelijk verlof, hervat. Op 17.1.48 ging in de Supra de aangekondigde koffietafel door: waren aanwezig een 25-tal deelnemers, waaronder 7 Brusselaars en 2 Antwerpenaars, welke gezellige uren in een stemmige atmosfeer doorbrachten. Nu, komt de beurt aan Brussel!

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMIOJ: Akiris la premion post enigmoj 29-30: S-ino R. Pintelon, el Blankenberghe; post enigmoj 31-32: S-ro E. Dhaenens, el Oostende.

SOLVO DE LA 33-a.

HORIZONTALE: 1. revok; kutim. — 3. dig; frizist. — 5. kinej; limig. — 7. spruc; simpl. — 9. fraŭlin; tro. — 11. nobel; garbo.

VERTIKALE: 1. radik; ŝafin. — 3. vagonar; arb. — 5. kafej; celil. — 7. kripl; sanig. — 9. tri; memstar. — 11. mutig; leono.

PRI LA 34-a: Bonvolu legi kiel difinojn sub « Vertikale. 3. »: Legoma vegetaĵo (R); fiŝo (R). — 5. Herbeca ... ktp. Ni akceptos la solvon ĝis la ĉisuba dato.

REGULARO DE LA KONKURSO. Pro elfalo de linio en la antaŭa numero, la punktoj 2a kaj 3a ne klaras. Ili teksti jene: « 2. ... La nomo de la gajninto kaj la titolo de la aljuĝita libro estas publikigataj. 3. La poentonombro de la premio estas reduktata al 0; ... »

N-ro 35: KRUCVORTENIGMO.


Ankaŭ por novuloj!

Horizontale. 1. palmofrukto (R); okul-kavo. — 3. bona akvo estas tia (R); ekkrio por aprobi (R). — 5. neprononcebla (R). — 6. longa, mallarga kaj maldika peco da ligno (R); en Ĉinujo oni fumas ĝin (R). — 7. Konjunkcio; skribajo, kiu rajtigas iun ricevi monon en banko (R). — 8. li klopodas disvastigi ideon (R). — 10. ili estas la plej karaj unu al la alia (R); ĝi montras emociion (R). — 12. elstaranta parto ĉe etaĝo de domo; nazego.

Vertikale. 1. sako remburita per molaj aĵoj (R); ĝi montras kiom bela vi estas (R). — 2. peceto (R). — 3. lumigilo (R);

sukoriĉa frukto (R). — 4. lumigilo (R). — 5. formi figurojn el ligno (R); birdo. — 6. sufikso (R). — 7. malmola parto de nia korpo; li ludas sian rolon (R). — 8. kontraŭstaro (R). — 9. intime interparoli; demeti ekz. mantelon. (R). — 10. adverba vorteto por esprimi plejproksimecon. — 11. ĝiaj folioj estas uzataj por fari trinkaĵojn (R); la ĉefo de la grupo (R). — 12. korpe batali (R).

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12



N-ro 36: KRUCVORTENIGMO.

(laŭ la krado de n-ro 35.)

Horizontale. 1. aspekti kiel io alia (R); korpoptato (R). — 3. tiuj, kiuj kunmetas tekstojn por gazeto (R); elĵeti el si ion malbonan. — 5. kunhelpanto (R). — 6. ne pli ol; meriti (R). — 7. konstante (R); plej forte. — 8. ŝi zorgas pri la hejmo (R). — 10. ĝi estas rezervita al piedirantoj (R); sentima (R). — 12. nacio, konsiderata en siaj rilatoj kun la fremdaj landoj; enskribita.

Vertikale. 1. ĝi estas dolĉa (R); dilettanto (R). — 2. prepozicio. — 3. nuntempa (R); lavilo (R). — 4. birdo (R). — 5. trinkaĵo (R); larvo. — 6. interjekcio.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr.
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.
Unu int. respondkupono valoras 3 bfr.

SE VI HAVAS INTERESON por la laborista movado, por sindikalismo kaj socialismo nepre mendu la jusaŭperintan, belaspektan, ilustritan, centpaĝan broŝuron: « La Sveda Laborista Movado » de Tage Linbom. Prezo: 15 bfr. ĉe Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W. (p.k. 326851).

AMIKOJ DE SANIGA VIVO, K-anoj en Malmö, pasigu viajn feriojn inter l'beraj homoj en unu el niaj somerkampoj en la sveda arkipelago aŭ en la insularo de la Balta maro. Senhezite skribu al ni: Norda Sunsperto, Gölgtatan 124, Stockholm.

Deziras korespondi kun teknikistoj-kolegoj pri la lukto kontraŭ la ratoj: Karl Wiencke, dipl.-ing. (24) Geesthacht-Eble, Schillerstrasse 5, Germanujo.

Unufoje okazas E.kurso en Rzesow (Pollando) kun 55 gekursanoj; por ĉi tiuj, letervespero estos aranĝata meze de februaro 1948: estas atendataj amase p.k., let., ĉiaj propagandiloj kaj proponoj de korespondado; bele afrankitaj respondoj estas certaj. Skribu al Rondo de Esperantistoj, (F. Noworol) en Rzesow, Skrytka pocztowa, 50, Pollando.

7. apartigi la dikajn partojn for de la maldikaj; trempi haringojn dum kelka tempo en vinagro kun spicoj (R). — 8. feliĉo kaj riĉo ĝin elvokas (R). — 9. vegetaĵo kun bonodoraj floroj (R); intence fuŝi (R). — 10. sufikso (R). — 11. instigi aŭ riproĉi (R); grandega (R). — 12. tiri post si (R).

Sendu la solvojn sur aparta folio al POSTBUS 342 BRUSSEL, antaŭ la 20.2. 1948.

3.

DEVENO & VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

Laŭ la lingvistika teorio — la praa hindeŭropa (t.e. vinda) lingvo kreskis, eligis nigro-grupojn, & rine naskigis plurajn branĉojn, kiuj iris malproksimen: al sudoriento ĝis Himalaja montaro, al okcidento ĝis Atlantiko, al nordo — ĝis Norvegio. Facile kompreniĝas ke ĉiu nomgrupo, kiu foriris el nejmlando sia, perdis la malnovan lingvon pro la izoleco & mikrado kun novaj fremdaj najbaroj. Tion bone ekzemplis Latinoj, kiuj — ioksangante — naskigis Francan lingvon en nord-okcidento & Rumanan en oriento. La foriro de Hind-Iranoj el Eŭropo okazis eble pro la forta puŝo de pliaj aziaj popoloj, kiuj kojnovoge penetris tra stepoj, norde de Kaspio. Azio senese sendis, el siaj pli-kaj-pi sekaj stepoj, pliajn homamasojn, kiuj eniris & malordigis tutan Eŭropon. Tio daŭris dum jarcentoj... Nur unu loko eŭropa restis arbarkonforma, pro sia malproksima situacio, pro siaj marĉoj, arbaregoj, klimataj cirkonstancoj: ĝi estis nuna Blanka Rusujo, kun pecoj da Lituvio, Polujo & Norda Ukrainjo. Tie restis konservemuloj, pacamantoj, indiferentaj je nova kulturo, kun siaj sovaĝaj bizonoj, aproj, kastoroj, ursoj, alkoj... La cetera Eŭropo senese transformiĝis en sia popularo. Hodiaŭ — sur slava prahejmo sidas maĝaroj, orient-rusoj sur ugra hejmo, sud-francoj sur la ligura, orient-germanoĵoj sur la balto-slava, hindoĵoj sur la dravida, bretonoj sur la atlanto-finna, kma.

Triobla kaŭzo preparis en la multlingva Eŭropa la internacie uzebian vort-trezoron, kiu jam per sia ekzistado sugestadis la ideon de la internacia helpa lingvo.

Unua kaŭzo estis en la origina parenceco de 150 hindeŭropaj lingvoj & dialektoj, dissemataj inter Javo & Islando. Jen la ideo de patro: hinda *patar*, persa *padar*, rusa *batja*, *podj*, gota *fadar*, latina *pater*, alt-germ. *fater*, ktp. Kaj ĝardeno: slava *gradina*, angla *garden*, albana *garth*, lat. *hortus*, friga *gardum*, gota *gards*, lit. *gardis*, fr. *jardin*.

Dua kaŭzo: influo de la vinda lingvaro al fremdaj najbaroj. Tial trovigis en la araba: *sabun* sapo, *seba* sep, *gelid* glacia, *eskut* atskultu, *taur* bovo, k.m.a.; en la malaja: *balok* trabo, *belaka* pura, *buku* libro, *dina* tago, *duva* du, *kampung* vilaĝo, *komedi* teatro, *tempo* tempo, ...; en la turka: *orfan* orfo, *bastun* bastono, *kanun* kanono, *furun* forno, *kova* kuvo, ...; en la estona *rikas* riĉa, *seeme* semo, *viin* vino, ...; en la maĝara: *bab* fabo, *iga* jugo, *nem* ne, *par* paro, *repa* rapo, *kokoŝ* koko, ...;

Tria kaŭzo: la tutmonda trafiko kiu alportis al Eŭropo afrik-aziajn vortojn: *Akacio*, *elefanto*, *karto*, *kemio*, *mumio*, ... estas egiptaj; *amen*, *jako*, *pasko*, *sabato*, ... hebreaj; *admiralo*, *alkoholo*, *cifero*, *dogano*, *gudro*, *jupo*, *kafo*, *magazeno*, *matraco*, *sukero*, *taso*, ... arabaj; *apaĉo* ĉokolado, *hamako*, *kakao*, *maizo*, *patato*, *tabako*, *tonto*, *uragano*, ... amerikaj.

La hellena-greka civilizo, kun la posta romana, lasis al ni la bazon de la scienco & teknika vortaro: *geografio*, *geometrio*, *geologio*, *filologio*, *astrologio*, *astronomo*, *ekonomo*, *teleskopio*, *telegrafo*, *telepatio*, *simpatio*, ...

Ankaŭ pli vasta estis la grek-latina influo en la kasta formo, per laŭvorta traduko. El *episkopos* naskiĝis: lat. *inspector*, germ. *Aufseher*, ang. *overseer*, sl. *nadzornik*, *nadziratel*. El *peristasis*: lat. *circumstantia*, fr. *circonstance*, germ. *Umstand*, sl. *obstojateljstvo*, *okolnost*, ... El *galaxias*: *via lactea*, *milky way*, *mleĉny putj*, *tejut*, ...; El *hydrohoos*: *aquarius*, *versean*, *water-carrier*, *vodolej*, *vizontö*, ...

Simila niveliga influo penetris ankaŭ en la fraz-konstruon, sintakson de ĉiuj kulturaj eŭrop-lingvoj.

Duobla jam en sia origino, la Blanka Raso do dispeci-

ĝis, kreis centojn da lingvoj & dialektoj, & havigis al Eŭropo tiun mozaik-aspekton, kiu mirigas venintan jankon kutimitan al la unuforma lingva regado en sia vasta patrujo usona.

Sed el ĉiuj partoj de la multkolora Eŭropo nur du atingis maksimuman gradon de plurlingva mozaiko & intermikso: *Macedonio* & *Grand-Lituvio*.

Pli konata estis la macedona miksaĵo, proverbigita eĉ en Parizaj restoracioj (*macedoine* multmiksa manĝaĵo fruktara aŭ legomara); el tiu lando originis la familio de ĉi-skribanto. Sed tiu nature riĉega lando, sub terura & terora osmana regado, estis en senesea tortura turmentado & revolucia fermentado. Studemaj macedonoj senese elmigradis pro la neeble tie trankvile labori. Tamen Macedonio de 9-a jarcento naskis la homon, kiu kreis unuan slavan abocion & fondis unuan literaturan lingvon.

La dua mozaika lando estis trankvila depono la Napoleona forkuro en 1812. Tie do ĉiu pacemulo havis favorajn kondiĉojn por sia studado, au hejma — aŭ en multaj lernejoj & universitatoj. Tri vivantaj kulturaj lingvoj (— germana, pola, rusa) & la latina estis tie studataj, kun ilia riĉa literaturo. Tiu lando naskigis du malnovajn ide-revoluciuojn. Kopernik & Kant, kaj ĝi sendube estis destinita al plej brila spirita kulturo.

Geografie, la koro de la Granda Lituvio estis la Blanka Rusujo.

RIGARDO AL BLANKA RUSUJO

Se Eŭropo estis predestinita kontinento por naskigi la Blankan Rason, en Eŭropo estis predestinita lando, kiu pratempem radiis kiel fokuso de la vinda (praa hindeŭropa) lingvo & kulturo; ĝi devis poste, en 19-a jarcento, ree ekradii kiel lulilo de mia kara lingvo... Tiu lando estis Blanka Rusujo (Belorusia), centra parto de la grand Lituvio, politika kombinaĵo, kiun oni distingu de la eta & vera Litovujo, etnografie limigita.

Jam la konturoj Eŭropaj montras ke tiu lando estas centro, ĉe la geometria punkto, trovata per cirkelo sur la karto, se oni serĉas mezon inter Norda Uralo & Suda Iberio, inter Skandinavio & Kaŭkazo! En la 19-a jarcento, tiu lando apartenis al Rusa Imperio. Dek lingvoj tie estis uzataj. Ĉiutage — rusa, pola, judgermana, germana, lituva, blankrusa. En preĝejo — latina, slavona, hebrea, tri antikvaj erudistaj lingvoj. En mezlernejo & en alta societo — kiel aldona aristokrata lingvo — la franca. Tiu deko da lingvoj interplektiĝis kun laŭlega & kontrabanda komerco, kun oficialaj & sekretaj preĝejoj. Oficiale funkciis nur kvar religioj: romkatolika, grekortodoksa, mosea, luterana. Por esti komplete, estu aldonitaj ankoraŭ: tataroj & ciganoj... tiel fine ni havos 12 lingvojn & 6 religiojn! La rusa Imperia estraro & la najbara germana (kiu havis reton da agentoj en tiu lando), ili ambaŭ profite ekspluatis tiun komplikan mozaikon, kaj eĉ plikomplikigis ĝin, lerte & kaŝe organizante, sur la horizontala mozaiko, ankoraŭ alian, vertikalan, laŭ la socialaj klasoj, de la altsocieta supro ĝis la mizera malalta tavolo, kontaktanta kun la koto.

Certe, iu okcidentano — franco, belgo aŭ anglo — povus freneziĝi, se li volus kompreni la veran socialan strukturon de la Belorusio... sed la lokaj landidoj, kies cerbo perfekte adaptiĝis al la situacio, opiniis natura la mozaikon, kaj eĉ volonte partoprenadis en oftaj foi-

roj & popolfestoj, dum kiuj la multvariaĵoj iris ĝis eksaltacio. Kiu povis — de-temp-al-tempo — doni bakŝison (trinkmonon) al ĉiu el multaj imperiaj oficistoj & policanoj — tiu vivis trankvile, kaj ne havis la tempon por enuigi.

En tiu predestinita lando estis slavice predestinita medio — juda popolo, kiu posedis multe pli subtilan intelekton ol ĝiaj preskaŭ barbaraj mastroj & najbaroj: rusoj, poloj, germanoj!

En tiu juda medio, kun trimiljara tradicio, floradis kosmopolitaj & internaciemaj tendencoj. Iliaj mistikaj doktrinoj devenis el la antikva mesianismo & el mezepoka kabalo. Ĉiu el ili, sidante en plej obskura urbeto, tamen konsciis ke liaj kunfratoj estis dissemataj tra la tuta mondo... Eĉ malestimataj, ili paciencis, interne subtenataj per la triba fiero, per la espero pri venonta spirita regno. Cionista movado floris tiutempe, volonte el malhela geto al la tutmonda lum-horizonto. Apude, pli eŭrop-kulturaj, riĉaj, skeptikaj — estis aliaj judoj, volonte alprenantaj la kristanan naciecon... Sed ili ne plu apartenis al la Belorusia spirito, ili jam fremdiĝis al la veraj judoj, kiuj ne ŝatis socialismon, nek modernan sciencion.

RIGARDO AL BLANKA TORENTO

Pense vojirante tra la Blanka Raso, ni eltrovis la kontinentan, la landon, la medion — plej favoran por la mondlingva kreado. Fine, ni alvenas al la urbo.

Tri popol-influo renkontiĝas: pola, lituva, rusa. Sur tiu kruc-punkto staras la urbo *Belostok* (pole Bialystok), kies nomo sencas laŭvorte: Blanka Torento (kunfluo).

Estas rimarkinda koincido de multaj « blankaj » nomoj sur tiu terpeco. La urbo Belostoko sidas sur la rivero Blanka (Belaja), kaj ĝin ĉirkaŭas blankrusaj vilaĝoj. La blankrusoj (belorusoj) estas konataj pro ilia blondeco & vestaja blankeco. Sude estas Belsk, kies nomo sencas: Blankurbo. Ankoraŭ 40 km. al sudoriento — la urbeto Belovej (laŭvorte: blanka turo). Fine, la apuda arbarego, monde konata: Beloveja Puŝta (= blanktura arbarego), kun lastaj zubroj (bizonoj) aŭ uro-bovoj, detruitaj jam delonge en la tuta Eŭropo, kun la alkoj & kastoroj. En la Beloveja Arbarego ili vivas — 300 aŭ 350 — sub la protekto de la estraro. Nature, kun ili, tie vivas en libera stato ankaŭ alkoj, kastoroj, ursoj, lupoj, kapreoloj, cervoj, kaj ceteraj maloftaj bestoj, lastaj « mohikanoj » de la prehistoria Eŭropo, pri kiuj ni legas en la antikvaj kronikoj, & ĉe Julio Cezaro.

En Belostoko naskiĝis Zamenhof, kaj kun li — Esperanto...

Ni estis feliĉaj trovi en malnova gazeto « The Esperantist » (1904) la artikolon de George Henderson, kiu skribis:

« Estas iom stranga koincido, ke la patrujo de D-ro Zamenhof estas la naskolando ne sur de la plej nova inter la eŭropaj lingvoj — Esperanto — sed ankaŭ de la plej antikva, originala, praa lingvo, el kiu ĉiu hodiaŭa lingvo de Eŭropo (krom la baska, hungara, finna kaj turka) estas deveninta... »

Ne stranga, kiel skribis Henderson, sed natura & rimarkinda estas tiu koincido. Ĝi estis eĉ fatala, predestinita fakto, ke Esperanto, provo de eŭroplingva sintezo, naskiĝis en la antikva centro de la hindeŭropa praa lingvo, la sinteza lingvo de la tri kontinentoj: Afrika, Azia, Eŭropa!

(Daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.